**N I A  V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JUNIO 2000**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto


**EKSTERLANDE**

Pola Radio disaŭdigis intervjuon al **Augusto Casquero**. Li parolis ĉefe pri la kursoj en la Valencia Universitato kaj ankaŭ pri tio, ke aliaj hispanaj universitatoj (La Laguna, Barcelono, Euska Universitato kaj ĵuse Madrido) estis petintaj informojn al la valencia por la okazigo de kursoj de Esperanto. Augusto estis en Pollando por prelegi en Bydgoszcz kadre de la Kultura E-semajno.

Dum la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA festparolis Gian Carlo Fighiera, iama KKS de UEA kaj multflanka movada aktivulo. Li prelegis trifoje pri la obstakloj kaj ŝancoj, kiujn li vidas por Esperanto en la tria jarmilo. Grandan atenton li donis al la decida rolo de UEA tiurilate. Kiel Fighiera atentigis, almenau nau el dek esperantistoj referencas al UEA, sendepende de tio, ĉu ili mem membras en ghi.

**HISPANIO**

En **Barcelono** ĉe Unesco-Klubo okazas la dua universitata kurso, la sukcesintaj lernantoj ricevos 3 kreditoj de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono. Instruas la prezidantino de Kataluna Esperanto-Asocio

**FUNDACIÓN ESPERANTO**

En la Asembleo de HEF la Prezidanto anoncis ke Fondaĵo Esperanto buĝetis por tiu-ĉi jaro 600.000 pesetojn por subvencii konkretajn projektojn de esperantaj asocioj. Legu la kondiĉojn en la venonta numero de Boletín.

ESPERANTO EN EŬROPA UNIO

RetInfo disvastigis la liston de Germain Pirlot je 20.04.00., lau kiu 9 el la 64 hispanaj europarlamentanoj estas favoraj al Esperanto. Jen la nomoj:

FERRER i CASALS Concepció, PPE/DE.
GARRIGA POLLEDO Salvador, PPE/DE
GASÓLIBA i BÖHM Carles Alfred, ELDR
GIL-ROBLES GIL-DELGADO José María,PPE/DE
IZQUIERDO ROJO María, PSE
MEDINA ORTEGA Manuel , PSE
SAUQUILLO PÉREZ DEL ARCO Francisca, PSE
TERRÓN i CUSÍ Anna, PSE
ZABELL LUCAS Teresa, PPE/DE

**ESPERANTO EN INTERRETO**

Membro de Kataluna Esperanto-Asocio gvidas TTT-kurson en la kataluna. Kontraŭ malalta prezo la lernanto povas libere konsulti fakulon korentontan liajn ekzercojn. La adreso estas *www.xtec.es/~pmarti10/kurso.htm*

Jen la nova adreso kun la ventontaj esperantaj programeroj: *www.esperanto.hu*



ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ

En Majo okazis intervjuo en televidejo "Onda Norte" de San Sebastián de los Reyes, ĉi-jara kongresurbo. Partoprenis Manuel Pancorbo kaj Fernando Moral, parolintaj pri la pasinta kongreso kaj pri esperanto ĝenerale.

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Folklora Esperanto Festivalo Torun (Polando) 9-11 junio. Partoprenos "Grupo de baile de la Casa de Aragón en Valencia"

## 59-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Ekde la 29a de Aprilo ĝis 1a de Majo okazis en la vilaĝo San Sebastián de los Reyes, apud Madrido, la HEF-Kongreso-2000. La Urbestro salutis en esperanto, dum la inaŭguro, al la preskaŭ 70 gekongresanoj, poste, hispane, prelegis membro de Internacia Anmestio.

Dum la kongreso, profitante la instalaĵojn de la kongresejo, Jorge Camacho -profesia interpretisto- faris samtempa tradukado al la hispana aŭ al esperanto.

La programo inkludis paroladojn de Miguel Fernández pri "aktualaj esperantaj verkistoj" kaj seminarioj gvidata de la germana Sabine Trenner pri "solvado de konfliktoj". Multe amuzis la prelego de David Galadí pri astronomio kiu montris kial ne ekzistas en la ĉielo verdaj steloj.

Parolis hispane, Amelia Fernández, direktorino de la RNE-programo "Hablando en plata", la temo estis "Historiaj defendo-kriterioj de la lingvo". Esperante Sabine Trinner resumis sian laboron kiel voluntulino en Bosnio, ŝi ankaŭ verkis, kaj reĝirisoris amuzan teatraĵon en kiu aktoris multaj gekongresanoj.

La kongreso estis malfermita al la ĝenerala publiko kaj por ili A.Valén gvidis bazan kurson de esperanto al kiu aliĝis la Urbestro de San Sebastián de los Reyes kiu montris grandan intereson por nia lingvo. Kelkaj vizitantoj aĉetis e-librojn en la libroservo.

La diboĉa programo inkludis, aparte de la muziko de Solotronik, diversajn atelierojn kaj noktajn promenadojn tra Madrido kiuj mallacigis la gekongresanojn post la prelegoj pri interreto (M. Pancorbo), nuntempa esperanta poezio (M. Fernández) aŭ esperanto kaj samtempa tradukado. Post la kongreso Miguel Fernández gvidis viziton al la Muzeo de El Prado.

Ene de la programo okazis la Ĝenerala Asembleo de HEF kaj la livero de la Premio Klara Silbernik al Paquita Jiménez, membro de Madrida Esperanto-Liceo kaj edzino de Pepe Platas.

Novaĵoj en tiu-ĉi kongreso:

la salono ne havis e-flagon nek afiŝon kun la nomo de la kongreso

granda ĉeesto de junuloj kiuj donis allogan aspekton al la kongreso

samtempa tradukado (esperanto-hispana-esperanto)

programero titolita "kritika rondo pri la kongreso", tre interesa por plibonigi venontajn

senpaga aŭtobuso por iri ekde Madrido al la kongresejo

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelego: 12an de junio "Brikaj turoj en Aragón".